

La propono Haltu la malŝparo de energio!
de Svisa Ligo por la Protekto de la Naturo
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 574, 1974.10.09 & 12

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La asocio **Svisa Ligo por la Protekto de la Naturo** publikigis proponon, kies celo estas la orientigo de la uzo de la energio. Tiu propono al la svisaj aŭtoritatoj aperis sub la titolo *Haltu la malŝparo de energio !*

A.- En tiu manifesto 24-paĝa Svisa Ligo por la Protekto de la Naturo prezentas precizajn proponojn, kiuj, laŭ ĝi, permesus ŝpari 30'000 terakaloriojn, tio estas 17 procentojn de la nuna energi-konsumado en Svislando. Tiuj proponoj ŝajnas al ni efektiveblaj kaj realismaj. Jen ili iom resume :

Cl.- Per pli drastaj leĝoj oni povus jam ŝpari tiujn 30'000 terakaloriojn nur en la sektoro de la hejtado de la loĝejoj kaj aliaj konstruaĵoj. Jen la proponitaj rimedoj :

A.- Devigi la ŝanĝon de la fenestroj, kies kaloria valoro superas al 1,8. Tio permesus redukti gravan parton de la varmoperdo dum la hejtperiodo.

Cl.- La kaloria valoro estas mezurunuo, kiu koncernas la termo-izoladon. Ju pli ĝia valoro estas malalta, des pli la izolado kontraŭ la perdo de varmo estas bona. La valoro 1 signifas, ke je unu kvadratmetro oni perdas 1000 kaloriojn en unu horo, tio je diferenco de unu grado inter la interna kaj la ekstera temperaturoj. La kaloria valoro 1,8 signifas, ke en unu horo oni perdas 1800 kaloriojn je ĉiu fenestra kvadratmetro.

A.- Alia rimedo estus la plibonigo de la termo-izolado de la vandoj, tegmentoj kaj kondukiloj.

Cl.-Oni devus dependigi la koncedon de konstrupermeso de precizaj kondiĉoj koncerne la kalorian valoron de la ekstera surfaco de la konstruaĵoj. Inklude la fenestrojn, la kaloria valoro ne devus superi 0.75.

A.- Ĉiuj radiatoroj devus posedi termoregulilon, kiu malebligas temperaturon superan al 20 gradoj en la uzataj ĉambroj, kiu reduktas tiun temperaturon dum la nokto kaj en la neuzataj ejoj.

Cl.- Devus okazi regulaj kontroloj de la mazutaj hejtiloj.

A.- En la amasdomoj komputiloj devus mezuri por ĉiu loĝejo aparte la konsumadon de varmo kaj de varma akvo. Ankaŭ devus okazi apartigita fakturado laŭ lakonsumado individua.

Cl.- Oni devus malpermesi la hejtadon de garaĝoj aŭ remizoj kaj de privataj naĝejoj, la instaladon de klimatiziloj en la loĝejoj, oficejoj, magazenoj kaj normalaj entrepenejoj, kiam ili ne estas absolute necesaj.

A.- Duaranga ŝparo-propono koncernas la transport-sektoron. Ĝi koncernas 11'000 terakaloriojn aŭ 6 procentojn de la nuna energi-konsumado en Svislando. Jen la proponitaj rimedoj :

Cl.- Altiĝi la prezon de la benzino kaj mazuto, elprenante imposton uzotan por la disvolvo de la publikaj transportrimedoj kaj por la redukto de iliaj tarifoj.

A.- Inkludi la fiksan impostadon de la motor-veturiloj kaj de la asekurkotizoj en la prezo de la benzino kaj mazuto. La kreskigo de la variaj elspezoj kaj la redukto de la fiksjaj elspezoj kuraĝigas malpli grandan uzon de la personaj veturiloj.

Cl.- Limigi la rapidecon de la veturado. Aŭtoŝoseoj : po 100 kilometroj por horo ; aliaj eksterurbaj stratoj : po 80 kilometroj, trafiko en loĝlokoj : po 50 kilometroj.

A.- Malpermesi la akcepton de motor-veturiloj, kies benzin- aŭ mazut-konsumado tro superas la meznormon.

Cl.- Malpermesi la veturadon en ripoz- kaj loĝ-lokoj, en la centro de la urboj. Krei vojarojn por la piedirantoj kaj por la biciklantoj.

A.- Konstrui la parkejojn ne en la centro sed en la ĉirkaŭo de la urboj, tio por favori la uzon de la publikaj transportiloj.

Cl.- Favori pli racian uzon de la kamionoj per kontraktoj inter la kamionistoj : kooperado kaj disdono de aktivec-sektoj.

A.- Fiksi tarifojn fervojajn, kiuj favorus la fervojajn transportojn, kiam tio estas ebla.

Cl.- Limigi la nenecesajn uzojn de aviadiloj kaj helikpteroj.

A.- Koncerne la industri- kaj meti-sektojn kaj la dommastrumadon, ankaŭ ŝparrimedoj estas eblaj. Antaŭ ĉio ili koncernas la reutiligon de la perdita varmo kaj la konstrunormojn de la mastrumadaj maŝinoj. Sed la ŝparo de tiuj sektoj maksimume povus atingi 3 procentojn de la nuna energi-konsumado en Svislando.

Cl.- La venontan semajnon ni vidos, kiajn kritikojn oni povas fari al tiuj proponoj, kiuj havas la avantaĝon proponi veran politikon pri energio kaj rimedojn, kiuj permesus ŝpari inter 27 procentojn kaj 17 procentojn de la nuna energi-konsumado en Svislando.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!